Prelegis kiel planite la 16an de junio, en salono de la urbdomo, antaŭ deko da klubanoj -kaj du neesperantistoj- J.R. Rodriguez Gomez, ĵurnalisto el Kubo. Lokaj samideanoj gastigis lin tiuokaze kaj vizitigis al li, krom la urbon, la famekonatan nekropolon de Douaumont. Kiel siatempe alia gasto el Rumanio, li iĝis ege impresata de la loko kaj ĉefe de la aŭd-vida muntaĵo demonstranta la absurdecon de l' milito.

Dum la somerperiodo, inĝeniero el Ĉinio, Li-Keksi, vizitis sian korespondantinon, Mireille Dillenschneider, kiu konatiĝis kun li okaze de iama vojaĝo al Ĉinio. Li ankaŭ fruktodone rilatis kun la sekretario de la loka klubo, samideano F.-X. Gilbert, Direktoro de la Industri- kaj Komerĉambro departementa. Eventualaj starigoj de komerc-interŝanĝoj estis memevidente pridiskutitaj.

La preparo de la E°-aŭto-ralio (19an de septembro) estas prizorgataj de la kutimaj klubanoj. Ĝi ebligas al la partoprenantoj malkovri tute originalan aspekton (ne nur geografian!) de la departementa centro.

Cetere 3 klubanoj partoprenis memorindan piedmigradon tra la pirenea montaro kaj unu gastis denove en la Kultur-Centro de La Chaux-de-Fonds (Svisio).

Antaŭvidiĝas malfermo de la-grada kurso (eventuale 2a-grada) paralele al instruo de E° al la nova staĝanaro de "IFV 55".

## METZ

☆

La tre vigla Metza Esperanto-klubo okazigis sian solenan bankedon la 12an de junio. En la kulturdomo de Metz renkontiĝis ĉirkaŭ 25 homoj; inter ili ĉeestis kelkaj eksterlandaj gastoj kaj la estro de la kulturdomo. Nian rondon ankaŭ partoprenis S-r° Oliver WALZ, vicprezidanto de Sarlanda Esperanto-Ligo.

Post la financa raporto, la prezidanto de la klubo, Bernard VIVIER, resumis pri la pasintjaraj (multnombraj) aktivecoj; finfine estis denove elektita unuanime la tuta klub-estraro.

Ni dancis, multe babiladis kaj sufiĉe ĝuis la ĉinan manĝaĵon. Dank' al la diligentaj helpantoj tiu festo estis tre bone aranĝita. Gratulon kaj dankon!

Sylvia Lassika - Wiernsheim

## en nia leter-kesto dans notre courrier

☆

"...Je profite de l'envoi de mon chèque pour la poursuite de mon abonnement pour adresser mes sincères félicitations à toute l'équipe qui travaille à produire "La Informilo", cette revue qu'on attend et qu'on reçoit toujours avec beaucoup de plaisir".

Lucienne TREHEL (25-Besançon)

## Ĉu praviĝas (aŭ decas...) tiel diskriminacii?

Traleĝante la informon (kiun certe ŝovos la redaktoro de "La Informilo"-n en la kutiman evento-kalendaron) pri la okazonta **Nov-jara Internacia Festivalo** en Germanio, de la 27an de decembro ĝis la 3a de januaro en SENSENSTEIN, pripensigas la fakto, ke **rajtos** (?) partopreni homoj nur inter 25-55 jaraĝaj... Mi sekve supozas, ke ekster tiuj aĝ-limoj, la cerbo-ĉeloj ne plu kapablas aprezi la temon de la aludita renkontiĝo, t.e. "La Esperanta Literaturo"... Aŭ ĉu oni timas, ke la sinteno de la esperantistaj olduloj (pli ol 55 jaraĝaj!) perturbu grave la mense normalajn partoprenontojn (vidu supre ties aĝkategorion).

Kial diable la CO de UEA ne adoptas tiun drastan regulon? Ne plu estus problemo por malkovri taŭgan halon por la solenaĵoj de la U.K°j!

Ĉu William AULD kaj Marjorie BOLTON estos tamen invititaj al la Festivalo?

"Kadukiĝinta Kandido"

## kaleidoskopo de tout...un peu



Ni iomete anticipu la distran pagon!..

### Miskompreno

Angla familio libertempis en Germanio. Dum la promenado ili rimarkis belan dometon, kiu tre taŭgus por la venontjaraj ferioj. La proprietulo, protestanta pastoro volonte luigas ĝin al ili. Post la reveno al Anglio, la edzino konstatis, ke en la dometo ŝi ne rimarkis necesejon. Pro tio ŝi tuj skribis al la pastoro:

"Estimata Sinjoro Pastoro!

Mi estas la angla sinjorino, al kiu vi luigis vian dometon por la venontaj ferioj, sed mi konstatis, ke en la dometo mi ne rimarkis WC. Ĉu vi bonvolus indiki al mi, kie ĝi troviĝas. Kun estimo, N.N."

Ricevinte la leteron, la pastoro ne komprenis la mallongigon WC, kaj pensante, ke temas pri anglikana kapelo (Welsh Chapel), li respondis jene:

=====  
origino: "Hungara Fervojisto"  
ĉerpita el "Esperanto Aktueli!"



"Estimata Sinjorino!

Mi havas honoron informi vin, ke la loko, kiu interesas vin, troviĝas je 12 km-j de la dometo, kio estas iom malmalgraba por tiuj, kiuj kutimas ofte viziti ĝin. Kiu kutimas tie resti pli longe, li kunportu ion por manĝi. Ĝis la loko oni povas iri piede, bicikle aŭ aŭtomobile, sed venu frue por ne ĝeni la aliajn. En la konstruaĵo estas 100 lokoj por stari kaj 40 por sidi. Ekzistas aerregulilo por elimino de malbonodoroj. La sidlokoj estas kovritaj per ruĝa veluro. La infanoj sidas kun la patroj, kaj ĉiuj kantas, frapas per manoj kaj piedoj. Ĉe la eniro oni ricevas paperpecon, kaj kiu malfruas, povas uzi la paperon de la najbaro. Ĉe la eliro oni redonu la paperon laŭeble neĉifonitan por ke oni povu reuzi ĝin almenaŭ dum unu monato. Ekzistas grandaj disaŭdigiloj por ke la sonoj estu aŭdeblaj, kaj por konsoli tiujn, kiuj ne povis eniri. Kion oni kolektas, oni disdonas al malriĉuloj. Ekzistas eĉ specialaj fotistoj, kiuj fotas vin en diversaj pozoj, por ke ĉiu povu vidi tiujn homojn okaze de tiel homeca ago.

Kun estimo. B.B "

### RADIO VATIKANO

#### ESPERANTO - elsendoj

Plenumas unu jaron la persatelitaj elsendoj de Radio Vatikana. Ankaŭ niaj dimanĉaj elsendoj estas koncernataj. La signalon dissendas satelito Eutelsat II-F1 (13 gradoj oriente, 11.544 GHz, video MBC, kun subportanta frekvenco 7.74 MHz en frekvenc-modulado, horizontala polarizado). La tabelo kun ĉiuj horaroj kaj frekvencoj - kiun vi vidas ĉi-dekstre - indikas per la litero "S" la elsendojn kapteblajn el la satelito: la kvalito de ilia son-signalto estas tre bona, pli ol tiu kaptebla per la tradiciaj mezaj kaj kurtaj ondoj. La satelitajn elsendojn oni povas kapti en Eŭropo kaj Norda Afriko uzante

satelitan antenon el unu metro kaj ne tro komplikan ricevilon. En lokoj pli foraj ol la menciitaj, la diametro de la uzata anteno devus esti almenaŭ 1,8-2,4 m. La satelitaj elsendoj malfermis tute novan epokon, espero-kaj promes-plenan: la aleŭropaj elsendoj konsistigas la unuan paŝon, atende de la plivastigo al aliaj kontinentoj. Radio Vatikana spertas emoci-donan, sed ankaŭ malfacilan momenton. La malavareco de niaj bonfarantoj povus elmontrian decidigan rolon: pli ol iam la Radio de la Papo bezonas konkretajn helpo-signalojn kaj subtenon fare de ĉiuj, kiuj konas kaj ŝatas nian laboron.

Ni memorigas la datojn de la ekstercaj programoj en Esperanto fine de la jaro 1a de novembro: 8a, 24a, 25a kaj 31a de decembro 1993; 1a kaj 6a de januaro 1994, ĉiam je la universala horo 20a kaj 20 minutoj. Ĉi tiuj ekstercaj elsendoj aldoniĝas al tiuj *ordinaraj*, kiuj okazas ĉiun ĵaŭdon je la universala horo 6a kaj 10 minutoj kaj ĉiun dimanĉon je la universala horo 20a kaj 20 minutoj. Viaj leteroj ĉiam gravas! Adresu al: Radio Vatikana, Esperanto-redakcio, SCV - 00120 Città del Vaticano. Bonan aŭskultadon!

\*\*\*\*\*

### NOVA INICIATO


de nia samideano  
Raymond BORÉ

Vere nelacigebla  
homo!

Post lia lanĉo de eŭropa peticio al la Eŭropa Parlamento (kun G. PIRLOT), kiu daŭre valoras (nepre uzu la ŝovitan dokumenton en la lasta "Informilo"!), Rd Boré

proponas poŝtkarton, kiun vi malkovras ĉi-supre. Plej originale elstaras lia ideo presigi specifan kadron supre, ĉe la dekstra angulo, honore al Zamenhof. En ties centron vi algluu la necesan poŝtmarkon! Tiu poŝtkarto (verdkolora) estas eldonita sub la aŭspicoj de la "M.J.C. ESPERANTO", 311 Fg Montmélian, F-73000 CHAMBERY

Prezo ne indikita



pour vous initier à la seule  
vraie langue  
internationale, pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto...




**NE PROKRASTU**  
**VIA(J)N ALIĜO(J)N!**

➔ **nos stages, nos congrès,**  
**nos rencontres, nos voyages...**

16/17-10-93	36a Praktika Staĝo de de Parolata Esperanto	16, Rue du Bouxhof F-68360 MITTELWIHR	(aliĝilo en "La Informilo"82)
12/14-11-93	8a Arta Festivalo Pariza		(informo en ĉi-tiu bulteno)
11/14-11-93	Internacia Rulsketil- presentado (ne specifa esperanta)	Nlle Salle Omni- sports 57-HETTANGE-Gde	(informo en ĉi-tiu bulteno)
10/12-12-93	42a Kultura Semajnfino de SEL	Kardinal Wendel Haus D-6650 HOMBURG Saar	(aliĝilo en ĉi-tiu bulteno)
27-12-93... 03-01-94	Novjara Internacia Festivalo (E°-Literaturo...)	D-SENSENTSTEIN (15km oriente de KASSEL)	H. D. PLATZ Postfach 1148 D-34303 NIEDENSTEIN
01-04 ĝis 08-04-94	10a P.S.I.- Invitas Germana E°-Asocio	D-JUNKERATH/ EIFEL	(aliĝilo havebla ĉe redakitejo de "La informilo" kontraŭ P.M°)

10a PSI  
nur por familioj!



**Printempa  
Semajno  
Internacia**

La aranĝo estas precipe familia seminario. La programo kontentigu  
egalrajte plenkreskulojn kaj infanojn. Ankaŭ ne-esperantistaj  
familianoj kaj komencantoj estas tre bonvenaj. Plejparte la  
programeroj dependos de la fantazio kaj bezono de la partoprenan-  
toj. Do, estas bonvenaj ĉiuj ofertoj kaj proponoj pri manlaboro,  
muzikumado, lumbildoj, teatraĵoj, naciaj kaj internaciaj ludoj,  
interesaj prelegoj ktp.  
La organizantoj zorgos pri interesa turisma programo kaj kompre-  
neble pri diversnivelaĵ Esperanto-kursoj.

\*\*\*\*\*

\*\*\*\* plus rapide... plus efficace ...



**NOTRE NOUVEAU COURS D'ESPERANTO**  
**PAR CORRESPONDANCE**



- ★ un matériel MODERNE
- ★ une technique EPROUVEE
- ★ un réseau d'animateurs COMPETENTS
- ★ un savoir IMMEDIATEMENT opérationnel

*une diffusion  
sur toute la région  
France - Est  
et au-delà!*

Activité **ESPERANTO** ☆  
COURS PAR CORRESPONDANCE

**Maison des Jeunes et de la Culture**  
**Philippe DESFORGES**  
**27, Rue de la République**  
**54000 NANCY**



# INTERNACIA KULTURA ESPERANTO FESTIVALO

## ARTOJ

### PROVIZORA PROGRAMO

VENDREDE, 12an de novembro 1993

**Festivalo de video-filmoj** (en la sidejo de UFE)

- Prezento de la video-bendoj senditaj por la konkurso pri video-bendoj.
- Proklamo de la rezultoj de la konkurso.
- Prezento de filmoj kaj video-bendoj, interalie la fama "Angoroj"

= Komuna vespermanĝo en tipa pariza restoracio =

SABATE, 13an de novembro

**Matene:** Vizito de kelkaj tipaj kvartaloj de Parizo

**Posttagmeze:**

- Inaŭguro de ekspozicio en la festivalejo.
- Koncerto de Franz-Georg kaj Rita RÖSSLER (Germanio).  
"Popolmuzikaj influoj en la eŭropa klasika muziko"
- Folkloraj dancoj.
- Teatraĵo (anoncota).

**Vespere:**

- Rok- kaj malrokmuzika koncerto de SOLO (Hispanio).

DIMANĈE, 14an de novembro

**Matene:** Literatura forumo - La tradukita literaturo (kun partopreno de pluraj famaj tradukistoj de literaturajoj en Esperanto)

**Posttagmeze:**

- Teatraĵo: "La lasta nokto de Marie-Antoinette", de usona verkisto Joseph BUSCH, aktorita de Julia CASTIAU (Belgio)
- Varietea programo: kantoj el Afriko, skeĉoj el Novzelando, kabaredaĵoj el Francio...

\*\*\*\*\*

La festivalejo estos ĉi-foje **en PARIZO mem**, relative proksime al la sidejo de UFE.


\*\*\*\*\*

Ni momente ankoraŭ klopodas aranĝi alvenon de pluraj aliaj artistoj. Definitivan programon ni poste anoncos al vi. Ĝi estos aŭskultebla **sur la aŭtomata respondilo de UFE: 16 (1) 48 87 07 42** ekde la 25a de oktobro.

Pluajn informojn vi povos ricevi ekde nun ĉe:

Cl. NOURMONT, 2 am Kläppchen, L-5682 DALHEIM  
= Fakso (352) 67 66 02

U.F.E. INVITAS VIN



## NI EKSKURSI EN ALZACO...

Dum nia ĝenerala kunveno de la 13a de junio ni decidis pri renkontiĝo turista en la alzaca urbeto EGUISHHEIM, apud COLMAR. Ĝi okazis la 26an de junio (sabate) kaj estis sukcesa, kvankam partoprenis nur 4 personoj! (Sed, se ni ne havis la kvanton, ni havis la kvaliton!).

Eguisheim estas rava alzaca urbeto, certe tiel bela kiel la pli fama RIQUEWIHR (kvankam la gvidlibro "Michelin" konsentas al ĝi nur unu stelon...). Tuj kiam ni alvenis, ni konstatis, ke homoj, aŭtomobiloj, busoj estis svarmantaj ĉie en la urbeto. Ni unue supozis, ke ili amase alvenis tie por bonvenigi nin, esperantistojn! Sed tute ne, oni eĉ ne atentis nin! Ni rendevuis antaŭ la preĝejo, kaj guste tie estis la plej granda popolamaso, tiel ke ni devis parki pli malproksime.

Antaŭ la preĝejo atendis kaleŝo kun kvar belaj blankaj ĉevaloj. Tiam ni komprenis: estis okazanta edziĝofesto! Ni atendis la eliron de la novaj geedzoj, al kiuj la spektantoj ĵetis rizon. Ni provis plej proksime foti, kaj finfine apenaŭ ekvidis la novedzinon... sed la ĉevaloj estis vere belaj kaj fortikaj, ankaŭ la kaleŝistino (fortika!).

Tuj poste ni vidis grupon da turistoj, al kiuj gvidistino klarigis pri la vidindaĵoj. Ni iom sekvis ilin kaj finfine eniris kun ili la urban kastelon. Tie akceptis nin ĉiujn la urbestro, li manpremis al ĉiu el ni kaj paroladis pri sia urbo. Ni tamen diskrete eliris, kiam li afable proponis trinki vinon (alzacan)!

Poste ni veturis al la proksimaj tri turoj super Eguisheim, kiuj fakte estas ruinaĵoj. Tie neniu urbestro akceptis nin, domaĝe! Poste ni provis viziti kvaran kastelon, bedaŭrinde ne viziteblan pro riparoj. La kvinan tyron ni vizitis tre proksime (PFLIXBOURG) sed en ĝi estas neniu pordo kaj nur unu embrazuro. Ĝi ŝajnis al ni rekonstruita nur por esti vidata el malproksime en la valo! La ekskurso finiĝis gaje dum vizito al nia prezidanto en STOSSWIHR, -kaj tie ni trinkis alzacan vinon!-

La proksima turisma renkontiĝo estos la aŭto-ratio prizorgata de "Esperanto-Meuse", la 19an de septembro. sed tiu oni ne scios antaŭe pri la vidindaĵoj. Nur post solvado de enigmoj oni povos malkovri ilin! Ĉu ĉiuj ĉiam sukcesas solvi? Ni aŭdis iam pri Nancianoj, kiujn oni vane atendis por la tagmeza pikniko. Neniam ili alvenis. Ĉu oni revidos ilin? Iu flustris, ke oni vidis ilin fosantaj sur glacimonto en Norda Maro... Ĉu vere? Oni povas dubi, ĉar neniu informagentejo informis pri tio. Sed ĝenerale informagentejoj volas ignori ĉion, kio koncernas Esperanton kaj Esperantistojn!

J.-P. COLNOT

## ==== Vizitinda loko... CHATEL-ĉe-MOZELO ====

En la departementa Vogezoj, inter NANCY kaj EPINAL, situanta je la limo de departemento Meurthe-et-Moselle, staras "Châtel-ĉe-Mozelo".

Ĉu vi scias, ke en tiu urbeto oni malkovris spurojn de la mezepoka historio? Sen multe serĉi, ĉar mi havis bonŝancon, mi retrovis dokumentojn pri CHATEL, kiujn al mi donis lorena amiko. Mi provas resumi ilin.

## CHATEL-ĉe-MOZELO

## unu el la plej grandaj kasteloj en Eŭropo

CHATEL ludis grandan historian kaj strategian rolon ĝis 1940 kaj 1944. La fortikaĵo kontrolis la mozelan valon, la kruciĝon de tri romaniaj vojoj kaj la elirejon de la burĝonia vojo.

Ekde 1072 ĝi estis bieno de la grafoj VAUDEMONT, kiuj estis membroj de la plej juna branĉo de la nobela domo de LORENO. Poste, ĝi iĝis bieno de la potenca familio "COMTOISE". Dank' al geedziĝo ĝi fariĝis bieno de la Senjoroj de NEUFCHATEL, kiuj faris el CHATEL la centron de princlando sub la burĝonia influo. Iĝinta lorena dank' al interŝanĝo en la jaro 1544, Châtel kontraŭstaris la francan invadon dum la "tridekjara milito". Inter 1634 kaj 1670, naŭfoje regis ĝin novaj estroj.

Konstruita sur kalka promontoro situanta apud Mozelo, la kastelo superstaris la urbon kaj ĝiajn ĉirkaŭajn remparojn. Ĉirkaŭ la granda kvadrata ĉefturo grandiĝis la primitiva kastelo de la 11a jarcento ĝis la 15a. La du ĉirkaŭremparoj atingis kune 1,4 kilometron. Reto de subteraj galerioj kunligis la pordefendajn konstruaĵojn kaj komunikigis la kastelon kun la malsupro de la urbeto kaj la mozela bordo.

Ekde majo 1972, la Asocio dirita de "Vieux Châtel" entreprenis fosi la teron, cele malkovri la ruinojn de turoj, kaj poste, dank' al la helpo de de francaj kaj alilandaj bonvolemluloj, la asocio sukcesis plifortigi la elter-trovaĵojn: turojn, murojn jam cititajn, kaj plie, la subteran reton de koridoroj kaj cambroj. Ĉu vi scias, ke la mezepoka civito etendiĝis sur du trionoj de la surfaco de la nuna urbo? En ĝi la anaro nombris sep-cent-kvindek personojn, kiuj pagis impostojn. sed la nobeloj, la oficiroj, la dudekkvar arkistoj kaj la senhavuloj (jes... tiuj-ĉi jam ekzistis!) ne pagis impostojn. La vidvinoj pagis nur la duonon de la pagenda sumo, kiu feliĉe estis tre modesta: nur po 5 soldoj jare...

Laŭ la turismaj dokumentoj eldonitaj oni povas viziti la burĝodomon, kies konstruado kaj pli-grandigado daŭris proksimume 3 jarcentojn; oni ankaŭ povas vidi la preĝejon, putojn, kortojn, pro-vezejojn, ĉambron de la gardistoj, galerion de la artilerio, de la paf-arkistoj, ktp...

Ĉu vi venos kun ni por viziti Châtel?



LIBRO-SERVO  
12, Rue E. d'Orves  
F-54490 PIENNES

"... Papiliumi de unu temo al la alia"... Por ĝustigi la ĉi-suban informeton, jen esprimo ĉerpita el la freŝbakita "Grand Dictionnaire Français-Espéranto" (eldonita de FRANCE-ESPERANTO -UFE-), verko, kiun vi nepre kaj senprokraste devas havi daŭre submane! (Tiu esprimo troviĝas sub la vort-rubriko "coq"). Tiel komenciĝas recenzo pri tiu G.D.F.-E° en HEROLDO DE ESPERANTO sub la plumo de Carlo Minnaja:

"Laŭdo kaj gloro al la verkintoj, laŭdo kaj gloro al la eldoninto, laŭdo kaj gloro al la franca E°-movado, kiu subtenis ĉi eldonon!". Do, tuj mendu kaj aldonu al via PIV!

Jen pli ol interesinda -kaj interesiga!- verko...  
Nemalhavebla por ĉiu el vi!

### Historio de la mondolingvo Tri jarcentoj da serĉado

Vi scias, ke de la praaj tempoj la homoj sopiras al komuna parola ligilo sur tiu terglobo. Konkrete, ekde la deksepa jarcento, la kleruloj klopodas trovi tiun solvon. Ni citu la plej gravan, la unuan imponan, la francan filozofon DESCARTES, kiu en 1629 jam diris: "La artefarita lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi la sciencon..."

Pri la longa vojo sekvata de la ĉi-supre aluditaj sercistoj brile rakontas la latva verkisto E. DREZEN, en fenomenaj verkaĵoj eldonita en 1931 (D. mortis en 1937).

Tra tiu libro ni konas la historion ĝis antaŭ la dua mondmilito. Kia interesoplena libro! Ĝin mi aĉetis okaze de la antaŭlasta staĝo en Hettange, dank' al nia litova samideano Algis -saluton!-. Li vendis kelkajn librojn... kontraŭ dolaroj! Kaj, ĉar mi daŭre interesiĝas pri la historio de "nia" lingvo kaj pri la evoluo de la "movado", mi malkovris en ĉi-tiu libro interesajn klarigojn pri la sinsekvaj klopodoj celantaj krei "artefaritan" lingvon. Efektive temas pri la diversaj provoj rilate elfaradon de komuna komunikilo.

Sed kia laboro! kiom da homoj penis dum jaroj, kelkfoje ridindaj sed ankaŭ kleraj. Ĉiupaĝe mi komparas, mi rilatas al la verkaĵo de Zamenhof. Sendube, neniu homoj, konscie, ne povas nei, ke tiu viro verkis la plej taŭgan, simplan inter tiuj plurcentoj da "kreintoj" dum plurcentoj da jaroj! Nekredeblaj poste, la provoj de iuj "plibonigi" la verkaĵon de Zamenhof, kiu kondukis al Ido. Ĉu vere vi konas la historion de la aliaj ĉefaj, tiel nomataj artefaritaj lingvoj?

Drezen dediĉis multe da paĝoj al Volapük, Ido, ktp, kaj ankaŭ al la rilatoj kun la imperiismo, ĉe la fino de la lasta jarcento, al la apero de la proletaro, kiu rilatas kun la Historio (kun "granda H!"). Fantasta!

Almenaŭ pere de tiu libro, vi povos forĝi novan ideon pri "nia" lingvo, kaj se efektive la lingvo de Zamenhof havis, havas -kaj havos!- sukceson, rezultas nur de la fakto, ke ĝi estas la plej genia, kaj laŭ mi, la plej kompleta; tion vi povos konstati ĉe ĉiu paĝo de la libro. Tiamaniere mi ne "parolas", ĉar mi estas esperantisto... sed tamen mi ne povas ĉirkaŭi la elekton de la lingvon de Zamenhof. Bedaŭrinde la nescianta -ignoranta- popolo ne konas tiun aferon! Ho ve, se ĝi sciis!

Dankon pro la konatigo de tiu libro kaj sekve, ĝin mi deziras konatigi al la samideanaj kolegoj... Ĉiu esperantisto devus iom pli scii pri la historio de "artefaritaj" lingvoj, por pli bone alfronti la kontraŭulojn de Esperanto.

Ni ankaŭ ne forgesu trastudi alian faman kaj gravan verkaĵon: "La danĝera lingvo" de Ulrich LINS.

Roberto KUENY

#### NI DANKU

SinJORINO WOHLSCHLEGEL de Hagenau donacis al la Federacio 2 bibliojn en Esperanto. Ili iru al junaj paroj bezonantaj spiritan helpon. Interesatoj bonvolu sin turni al la prezidanto.

#### NEKROLOGO

En aŭgusto mortis en Hausen/Bad Krozingen (Germanio) longjara amiko de la elzaciaj esperantistoj, S-r° Karl-Heinz RENSCHLER.

Plej sincerajn kondolencojn al la familio.

=====



# PETICIO POR LA RAJTOJ DE LA VENONTAJ GENERACIOJ

La troloĝateco kaj la senbrideco de la homaj aktivadoj estigas teruran minacon por niaj posteuloj.


La Deklaro pri homaj rajtoj, kiu proklamas ĉies liberecon kaj egalecon, estas ducentjara. Tiu ĉi belega teksto ne plu sufiĉas.

Ni postulas, ke estu solene deklaritaj la rajtoj de la venontaj generacioj, por ke ĉiuj homoj heredu neinfektitan planedon, kie ĉia formo de vivo povos disvolviĝi.

Subskriboj sendotaj  
antaŭ septembro 1994



Jacques-Yves Cousteau



Jean-Michel Cousteau

*Subskribante la peticion de la Skipo Cousteau, mi petas la ŝtatestrojn de la tuta mondo uzi sian influon por ke la Unuiĝintaj Nacioj kalkulu kun la rajtoj de la venontaj generacioj.*

**NOMO** (en majuskloj)

**ADRESO**

**SUBSKRIBO**


Por Eŭropo kaj Afriko, bonvolu resendi la peticion al  
Equipe Cousteau - Pétition  
75809 Paris Cedex 17  
France

Por Amerikoj, Azio kaj Oceanio, bonvolu resendi la peticion al  
The Cousteau Society - Petition  
870 Greenbrier Circle, Suite 402 - Chesapeake  
VA 233290 USA



Equipe Cousteau

Fotokopioj estas akceptitaj



The Cousteau Society





24h. sur 24

## "MINICOM" POR RESPONDECULOJ... KAJ ALIAJ!

Kio estas "MINICOM"?... Tutsimple kvazaŭ leter-skatolo, kiu pacience atendas, ke vi malfermu ĝin! Se vi disponas pri "Minitelo", malfermu kaj uzu tiun modernan mesaĝ-skatolon!

Kiamaniere?

1 - Vi volas telefoni al iu, kiu ne estas; vi ne volas skribi leteron sed simple lasi mesaĝon; nokte vi pensas pri io, sed ne volas vekti vian korespondanton!...

La bona solvo: **per Minicom!**

... Vi enŝaltas vian minitelon, ciferumas **pertelefone** la numeron **3612**; kiam ekestas sono, vi konektas vian minitelon (specifa ŝaltilo sur la klavaro) kaj aperas sur la ekrano la diversaj paŝ-informoj por tajpi mesaĝon. Kiom kostas?... Malpli ol 1F/minuto...

2 - Vi malofte sidas apud via telefono kaj ne pretas aĉeti respondilon. Tiam la aliaj lasas mesaĝon al vi. Kiam vi revenas, aŭ kiam vi pensas pri tio, vi same enŝaltas vian minitelon, ciferumas 3612 laŭ la pindikitaj paŝoj sur la ekrano, vi tajpas vian telefonnumeron kaj vian **sekretan** kodon (ĝi garantias, ke **nur vi** povas legi la mesaĝon!) kaj kviete legas la mesaĝo(j)n. Se ne estas, bela frazo indikas, ke vi ne ricevis da ili... Kiam vi legis, vi povas konservi aŭ forviŝi la teksto(j)n. Kiom kostas la legado?... **Nenion!**

### Kiel aliĝi al MINICOM-servo?

Tute simple: sidante ĉe via telefono (aŭ starante!), enŝaltu la minitelon, ciferumu 3612. Kiam ekestas sono, konektu! La ekrano pleniĝas je teknikaj informoj, inter kiuj kuŝas "Vous n'avez pas encore de boîte"... Obeu la informojn por ĝin havi! Oni invitos vin tajpi vian nomon, vian telefonnumeron, vian sekretan kodon, **kiun vi anticipe imagis** (mot de passe). Lasta gesto: premo de la ŝaltilo "valider".

Ekde tiam, ni povos trafi vin telefone (memevidente se via korespondanto estas "minicom"-uzanto) aŭ reciproke!

Koran bonvenon en la "Minicom"-Klubon!

Note de la redaktoro: vi evidente povas peti senpage la specifan, tre kompletan broŝuron pri MINICOM ĉe la "Agence Commerciale Telecom". Ĝi enhavas plurajn kompletigajn kaj interesajn inform-detalojn.

\*\*\*\*\*

## NOVA SENKOMPARA RENDEVUO !

originala  
okulfrapa  
internacia  
kostumriĉa  
muzikbunta  
permanenta  
altnivela  
sportaŭdaca  
ĉarma  
rara  
rara  
elstara



Ĉiuj el niaj legantoj, kiuj ĉeestis la mirigan kaj mirindan spektaklon ofertitan vespere okaze de la E<sup>o</sup>-staĝo en HETTANGE-GRANDE (F-57) daŭre memoras ĝin!

Imagu, ke ankoraŭ pli imponan prezentadon vi povos spekti la 11/12/13/14ajn de novembro, denove en Hettange, "Nouvelle Salle Omnisports".

Ni ja povos frandi sensatiĝe la prezentadon de la plej famaj rulsketil-ĉampionoj dum la tiel nomata "Open International", kaj tio por la unua fojo en Francio!


Se ni aldonas, ke la diversaj sekvencoj, akompanataj de taŭga muziko, sinsekvos seninterrompe dum ĉiu tuta tago, ke vi povos manĝi surloke, kaj ke la tuta evento **estos senpaga**, ni ne dubas, ke multnombraj el ni migros al Hettange por ĝui tiun eksterordinaran sport-

eventon!

- laŭ entuziasmiga informo de nia sekretario  
Catherine GALLEG0

### OSEZ DONC L'ESPERANTO !

- L'esperanto, conçu par le docteur ZAMENIHOV en 1887, est aujourd'hui utilisé dans plus de 100 pays.
- Sa **grammaire** est facile, logique: pas de verbes irréguliers. Cette facilité est la même pour les Chinois, Arabes, Anglais.
- Cette langue vivante puise son **vocabulaire** surtout aux sources:
  - 75% gréco-latine
  - 25% germano-slave



### FORMATION DES MOTS

un système d'affixes

o	● masculin	● ovo	● bout
ino	● féminin	● bovino	● vache
ido	● descendant	● bovido	● veau
idino	● desc. féminin	● bovidino	
isto	● profession	● bovisto	
ido	● ensemble	● bovidaro	

(préfixes & suffixes)

permet de former un très grand nombre de mots avec **une même** racine.

● **PAMELO 1.1 N°2**

● **PAMELO 1.1 N°1**

● **PAMELO 1.1 N°3**

● **PAMELO 1.1 N°4**

● **PAMELO 1.1 N°5**

● **PAMELO 1.1 N°6**

● **PAMELO 1.1 N°7**

● **PAMELO 1.1 N°8**

● **PAMELO 1.1 N°9**

● **PAMELO 1.1 N°10**

● **PAMELO 1.1 N°11**


● **PAMELO 1.1 N°12**

Votre mémoire est ainsi énormément soulagée

### TERMINAISONS VERBALES


12 terminaisons suffisent

à reproduire toutes les nuances du présent, du passé et du futur.



### L'ATOUT D'UNE LANGUE P

avec Eurata pour traduire neuf langues officielles de l'Europe dans chacune des autres. Il faut 78 modules bilingues.



### QUELQUES MOTS UTILES

- KAFO
- APERITIVO
- SUKERO
- KUKO GÂTEAU
- LA TASO
- KULERO CULLIER
- BIERO VINO
- GLASO UN VRAI
- PLETO PLATEAU
- KAFO TEO
- ÇOKOLADO



### QUELQUES DATES

- 1859 naissance de Lazare Louis ZAMENIHOV à Blajestok (Pologne).
- 1887 Zamenihof publie le premier **esperanto**: le «Doktoro Esperanto».
- 1905 premier **Congrès Universel d'Espéranto** à Boulogne-sur-mer.
- 1914 première guerre mondiale: annulation du 10<sup>e</sup> Congrès Universel à Paris.
- 1987 72<sup>e</sup> Congrès Universel à Varsovie: on fête les «100 ans» de l'ESPERANTO.

### PHILATELIE & ESPERANTO



### CONGRES TOURISTIQUES

**universel kongreso**

1	1887	1887	1887
2	1889	1889	1889
3	1891	1891	1891
4	1893	1893	1893
5	1895	1895	1895
6	1897	1897	1897
7	1899	1899	1899
8	1901	1901	1901
9	1903	1903	1903
10	1905	1905	1905
11	1907	1907	1907
12	1909	1909	1909
13	1911	1911	1911
14	1913	1913	1913
15	1915	1915	1915
16	1917	1917	1917
17	1919	1919	1919
18	1921	1921	1921
19	1923	1923	1923
20	1925	1925	1925
21	1927	1927	1927
22	1929	1929	1929
23	1931	1931	1931
24	1933	1933	1933
25	1935	1935	1935
26	1937	1937	1937
27	1939	1939	1939
28	1941	1941	1941
29	1943	1943	1943
30	1945	1945	1945
31	1947	1947	1947
32	1949	1949	1949
33	1951	1951	1951
34	1953	1953	1953
35	1955	1955	1955
36	1957	1957	1957
37	1959	1959	1959
38	1961	1961	1961
39	1963	1963	1963
40	1965	1965	1965
41	1967	1967	1967
42	1969	1969	1969
43	1971	1971	1971
44	1973	1973	1973
45	1975	1975	1975
46	1977	1977	1977
47	1979	1979	1979
48	1981	1981	1981
49	1983	1983	1983
50	1985	1985	1985
51	1987	1987	1987
52	1989	1989	1989
53	1991	1991	1991
54	1993	1993	1993
55	1995	1995	1995
56	1997	1997	1997
57	1999	1999	1999
58	2001	2001	2001
59	2003	2003	2003
60	2005	2005	2005
61	2007	2007	2007
62	2009	2009	2009
63	2011	2011	2011
64	2013	2013	2013
65	2015	2015	2015
66	2017	2017	2017
67	2019	2019	2019
68	2021	2021	2021
69	2023	2023	2023
70	2025	2025	2025
71	2027	2027	2027
72	2029	2029	2029
73	2031	2031	2031
74	2033	2033	2033
75	2035	2035	2035
76	2037	2037	2037
77	2039	2039	2039
78	2041	2041	2041

Savez-vous que les plus importants sont ceux des associations **esperantistes**, jusqu'à 6000 personnes de 50 à 60 pays ?

● **PAMELO 1.1 N°8**

● **PAMELO 1.1 N°9**

● **PAMELO 1.1 N°10**

● **PAMELO 1.1 N°11**

● **PAMELO 1.1 N°12**

### EMISSIONS RADIO EN ESPERANTO

tous les jours

dimanche

jeudi

lundi

mercredi


samedi

● **PAMELO 1.1 N°9**

● **PAMELO 1.1 N°10**

● **PAMELO 1.1 N°11**

● **PAMELO 1.1 N°12**



ESPERANTO JUNIOR

la découverte de l'ESPERANTO

L'homme qui apprend plus vite que son ombre

ESPERANTO

UNE LANGUE POUR TOUT LE

esperanto

L'ESPERANTO: UN DROIT A LA COMMUNICATION

ESPERANTO

ESPERANTO l'image et la réalité

RENDEZ-VOUS

LANGUE INTERNATIONALE

### 36.15 ESPERANTO

TOUT SUR LA LANGUE UNIVERSELLE

Sur votre minitel:

- comment l'apprendre?
  - comment la pratiquer?
  - les rencontres régionales
  - les rencontres nationales
  - les prochains cours
  - les correspondances, les expos
- **PAMELO 1.1 N°11**



# INFORMILOJ

## 1 - EKSPOZICIOJ

1.1 Ekspozicio de UFE: kolorfotokopioj (formato A3) po 1: 30F

- |  |                    |
|--|--------------------|
| 1 - OSEZ DONC L'E° (5% slave,..)             | ( vidu aliflanke ) |
| 2 - FORMATION DES MOTS (bovo,..)             |                    |
| 3 - TERMINAISONS VERBALES (les 12...)        |                    |
| 4 - L'ATOUT D'UNE LANGUE PONT (drapeaux)     |                    |
| 5 - QUELQUES MOTS UTILES (kafo, teo..)       |                    |
| 6 - QUELQUES DATES (pri Zamenhof)            |                    |
| 7 - PHILATELIE (timbres E°) (nova)           |                    |
| 8 - CONGRES TOURISTIQUES (liste UEA)         |                    |
| 9 - EMISSIONS RADIO EN E° (horaires 90)      |                    |
| 10 - L'E° CA MARCHE! (avec globe)            |                    |
| 11 - 36.15 ESPERANTO (pri minitel)           |                    |
| 12 - LOGO ESPERANTO-FRANCE (dessin en cours) |                    |

1.2 Ekspozicio de Orienta Federacio  
ĉe Claude Nourmont, tel: 19.352.6.88.64

1.3 Ekspozicio de Provenca Federacio  
ĉe s-ro Cau, tel: 42.23.45.12

1.4 Ekspozicio de Norda Federacio  
ĉe Lucien Bourgois, tel: 21.49.13.38

## 2 - ALGLUEBLAJOJ

- |  |               |
|--|---------------|
| 2.1 Aĉtsunŝirmilo "E° internacia lingvo" (10x130)    | 40F           |
| 2.2 Ŝildo "E° langue intern. pourquoi pas?" (7,5x39) | 8F            |
| 2.3 Ovals Ŝildo kun la verda stelo kaj E° (14,7x10)  | 10F           |
| 2.4 Ronda Ŝildo kun tero kaj plurfoje E° (diam.12)   | 3F            |
| 2.5 9 diverstekstaj verdaj Ŝildetoj (3x4)            | unu folio: 2F |
| 2.6 Nous voulons apprendre l'E° à l'école (3x4)      | po 25: 3F     |
| 2.7 Bluaj etiketoj: "EUR + E°" (6x5)                 | po 1: 5F      |
| 2.8 Glumarkfolio: "Mi amas Esperanton"               | 3F            |
| 2.9 Glumarkfolio: logobildo Esperanto-France         | po 16: 20F    |

## 3 - T-CEMIZOJ

3.1 Kun blanka kaj verda mapo de Eŭropo  
ĉe s-ro Loisel, tel: 94.95.10.01

## 4 - POSTKARTOJ

- |  |     |
|--|-----|
| 4.1 Zorro, Lucky luke, Le petit chaperon rouge,<br>Adéquation, Esperanto 2000, E° je présume | 3F  |
| 4.2 Jubileo de Esperanto (por kolektantoj) numérotées  | 12F |

DERNIERE MINUTE: Nous prions nos lecteurs de bien vouloir excuser la parution retardée de ce n° de "La I°", retard dû à une panne sérieuse de la machine offset de notre imprimeur. Le prochain n° de fin d'année paraîtra normalement courant décembre.

## 5 - VIZITKARTOJ

5.1 Informteksto ambaŭflanke, dulingva, pri E°  
kun blanka spaco por via stampilo (13x8,5) po 10: 5F

## 6 - INFORMILOJ

- |   |                 |
|---|-----------------|
| 6.1 Le Premier de vos 10 Rendez-vous (4p.15x21)<br>por lude malkovri kiel funkcias E° | La unua senpage |
| 6.2 Rozkolora faldilo: Kursmetodoj  |                 |
| 6.3 Broŝuro: L'Espéranto ça marche<br>(blanka represo, eld.90, 16p 15x21)             | 10F             |
| 6.4 Verda libreto: E° une approche (16p 10,5x15)                                      | 11F             |
| 6.5 Casette de présentation: A la découverte de l'E°                                  | 15F             |
| 6.6 Por informi al Infanoj: E° Junior (3p 21x29,7)                                    | 5F              |

## 7 - POR INSTANCOJ & GAZETMEDIOJ

- |   |     |
|---|-----|
| 7.1 L'Espéranto: un droit à la communication<br>prestiĝa kolora broŝuro kun fotoj (16p 21x29,7) | 25F |
| 7.2 Espéranto, image et réalité (Piron) Paris VIII<br>broŝuro (80p 21x29,7) kun ekzemploj       | 30F |
| 7.3 "Que sais-je?": L'Espéranto (Janton) 3a eldono  | 32F |
| 7.4 Espéranto-Actualités, sujets divers (21x29,7)   | 5F  |

## 8 - POR LINGVISTOJ AU INSTRUISTOJ

- |   |     |
|---|-----|
| 8.1 Culture et Espéranto (A5, 20p) C.Piron                        | 6F  |
| 8.2 Docteur, je suis un pauvre diable<br>(format A5, 4p) C.Piron  | 6F  |
| 8.3 Espéranto et Enseignement (12p) E° Actualités UFE             | 6F  |
| 8.4 L'Espéranto joyau éducatif méconnu<br>(format A4, 4p) C.Piron | 6F  |
| 8.5 Réponses à certaines questions (A5,16p) C.Piron               | 5F  |
| 8.6 Une langue internationale (15x23, 40p) P.Rougetet             | 10F |
| 8.7 Confession d'un fou européen, C.Piron                         | 5F  |

Prix pour le matériel acheté directement au siège:

### FRANCE-ESPERANTO


4 bis rue de la Cerisaie  
75004 PARIS  
Tél: 42 78 68 86

Par correspondance:

Frais de port et d'expédition en sus:  
20 % jusqu'à 250 F  
10 % au dessus

Paiement comptant (UFE : CCP PARIS 855 35D ou chèque bancaire)

Edition: 3/92 - Prix valables pour l'année 1992.




# distra angelo



## KRUEVORTENIGMO KUN KAŜITA PROVERBO

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12 13 14 15 16 17 18



postul', pretend' - ŝanĝo de pozicio -avigo al si - ĉiela korp'. Ĝ kreskaĵ', el kies grajnoj oni faras panon - helgrizverda mineralo, uzata en Oriento por artobjektoj - tre grandaj - alpaŝo. H Forigo de la finala vokalo en vorto - ludkarto/atuto aŭ laŭvola anstataŭanto/ - idiliforme. Ĥ Arka mezurunuo por anguloj - movi turnante - artikuloj teksantaj retojn. I La dua parto de la proverbo.

**VERTIKALE** 1 Prepozicio/rimedo/ - skuiĝas, vibras - parteto. 2 Unu el la kontinentoj - trajnovoja stangar'. 3 Glueca suko de kelkaj arboj - infano de koko. 4 Aŭdorgano - perioda diverstema revu'. 5 Germana popola kanzono - sent', kiun kaŭzas fajro - geologia formaci' de sekundara epoko. 6 Virnomo - faruno knedita kun akvo/ plurale/ - persona nedefinita pronomo. 7 Esperanto/malrekomeninda mll/ - promenstrat' - manĝaĵ' el ovoĵ - mezurunu' de el. rezistanco. 8 Cefa parto de la nutrokanalo/digestsako/ - eligi flareblan aromon. 9 Nia planed' neentjereca, titra - vidorgan'. 10 Granda tropika herb', kiu post la florado mortas - havante senton de amiko - virina nomo. 11 Trigonometria funkci' - elmigris pro politika kaŭzo. 12 Kemia simbolo de arseno - propra nom' de Dio en la Korano - speco de amerikaj papagoj - nomo de romia monero. 13 Respondkupono/ml/ - petparoloj al Dio - per piede moviĝi. 14 Gelateneca substanco - doktoro/ml - kemiaj simboloj de argono, deŭterio kaj aluminio. 15 Sporuĵo de rustfungoj - malplena spacet', kiu apartigas tekstojn/kolumnojn/. 16 Ĉefurbo de Asirio - senkolora likvaĵ', uzata kiel solvilo "C6H4/CH3/2". 17 Difino de la valoro, fiksita prezo - hom', amanta sian patruĵon. 18 Sufikso uzata ĉe hidrokarbidoj - insekto, kies larvoj parazite evoluas sub haŭto de ŝafoj - ĉambro, loko.

HELPILOJ: F Ocima Ĝ Jado 5 Lido - lias 9 Oneca. 12 As. 15 Ecidioj. 16 Ksilen. 18 Olo.

**SILABENIGMO** - Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj vorteroĵ, malkovru vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj komumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon. ak ala an at ble emo ep er fe ik is it ko lo lo lo me mo ni no no no or oro pa po pro ri ro sa so te ti to to tra tu ur ve zio zo

- |                    |                         |
|--------------------|-------------------------|
| 1 + - - + - -      | mallonga literaturverko |
| 2 + - - + - - -    | haŭta afekcio           |
| 3 + - - + - - - -  | venena alkaloido        |
| 4 + - - + - -      | ia flavmalsano          |
| 5 + - - + - -      | atomnumero 92           |
| 6 + - - + - - - -  | beletra versa letero    |
| 7 + - - + - -      | homo similanta al alia  |
| 8 + - - + - -      | juvelŝtono              |
| 9 + - - + - - -    | nuntempa                |
| 10 + - - + - - -   | ia despota estro        |
| 11 + - - + - - - - | io solvenda             |
| 12 + - - + - -     | bendo ofte el ledo      |
| 13 + - - + - - -   | naturdotita parolanto   |
| 14 + - - +         | kruda besta haŭto       |

**SOLUTIONS (N° 82):** K.V.En.: "Kiu bati deziras trovos bastonon". Silaben.: "Eĉ plej ruza vulpo en kaptilon falas".

## CHARADE A TIROIRS... INTERNATIONALE!

Mon premier est un "aficionado"  
 Mon deuxième a apprécié la plaisanterie  
 Mon 3ème est une boisson dangereuse  
 Mon tout: "remaçanta mamulo ĝiba"...  
 ... laŭ P.I.V. (Raymond BORE)

### SOLUTION DE LA CHARADE A TIROIRS (La I° 82)

Mon premier est un assassin: **ES**  
 (parce que **Es** tue **Aire**!)  
 Mon 2ème s'acquitte de ses dettes: **PER**  
 (parce que **Per** paie **Tuel**!)  
 Mon 3ème est un portraitiste: **AN**  
 (parce que **An** fait ta mine!)  
 Mon dernier est un violent contradicteur: **TO**  
 (parce que **To** hue **Bohu**-!)